

Disvolvo de Esperanto-Lernado en Pollando

1-a minikonferenco DEL – Disvolvo de Esperanto-Lernado en Pollando

Dato: Sabato, la 23-an de majo 2026

Loko: klubo de BES en Bjalistoko, str. Piękna 3 + retaj partoprenantoj individue kaj grupe

Programo

10:40–11:00 – P. Wierzbowski – konektado de retaj partoprenantoj per Zoom

Parto 1 – Enkonduko

11:00 – P. Wierzbowski, J. Leyk – inaŭguro

11:05 – J. Leyk – *Kiel evoluas Esperantio – degeneraj minacoj* + diskuto

12:15 – tagmanĝa paŭzo

Parto 2 – Plan-preparo por la Projekto DEL – disvolvo de E-lernado en Pollando

12:45 – J. Leyk – prezento de la novpublikigita lernolibro *Aventuro per Esperanto*

- I. Koutny – mallonga recenzo de la lernolibro
- P. Wierzbowski – spertoj pri aplikado de la lernolibro dum aktuala kurso
- aliaj laŭbonvole

13:00 – kiel disvolvi lernadon de Esperanto en Pollando

- diskuto kaj la plano efektivigi la projekton DEL

14:00 – fermo de la konferenco




La registraĵoj el la konferenco estas troveblaj tie:

la unua parto: <https://www.youtube.com/watch?v=IGcRVRy7MhA>

la dua parto: <https://youtu.be/Jg1Wl-HsmcU>

I. **Jerzy Leyk - Kiel evoluas Esperantio – degeneraj minacoj – ĉefaj tezoj de la prelego:**


1. Bazaj terminoj – etno, etnolingvo, interlingvo, esperanto komunumo, Esperantio
 - a) „interlingvo” kiel tia ne ekzistas, ekzistas rolo de la lingvo kiel interlingvo en konkretaj situacioj
 - b) „Esperantio” (populara formo de pli sociologia termino „esperanto-komunumo”) estas: „imagita sfero en kiu funkcias esperanto-komunumo kune kun ties anoj”.
2. Evolufazoj de Esperantio – kun indiko de ekstera kaj interna paradigmoj
 - a) **1887 – 190x** – lingvofasciniga – ne ankoraŭ kreis paradigmojn
 - b) **190x – 197x** – konkera – esperanto celas konkuri interretnan komunikadon; *interna ideo* perfekte taŭgas plifirmigi e-portantaron
 - c) **1980 – 202x** – raŭma vekigo – ni posedas nian propran identecon – tio estas valoro; ne estas senco konkuri kun aliaj lingvoj en la rolo de interlingvo
 - d) **202x – 20??** - valorkonscia – esperanto ofertas unikajn valorojn i.a. plurlingvismajn, plurkulturecajn, kreivajn, mensoevoluigajn, hobi(ul)ajn; reproduktiĝi – estas nuntempe la ekzisteca tasko
3. Tipoj de sociaj movadoj:
 - a) ŝanĝorientitaj
 - i. radikala movado (ŝanĝo de la sociordo)
 - ii. reformisma movado (ŝanĝo enkadre de la ekzistanta sociordo)
 - b) esprimeca movado - ne celas ion ajn strukture ŝanĝi en la socio aŭ solvi sed **nur esprimi, popularigi siajn konvinkojn kaj sintenojn**
4. Esperantio ekde la mezo de la 1930-aj jaroj perdis trajtojn de reformisma movado – en tiu senco **E-movado tiam komencis malaperi**
5. Delonge e-strebadoj **ne havas karakteron de socia reformisma movado**
 - a) okupiĝado pri esperanto **havas unuavice hobian karakteron**
 - b) pro tio tradicia esprimo „E-movado” ne aparte taŭgas, „Esperantio”, „Esperanto-komunumo” estas pli adekvataj por analizoj kaj uzo
 - c) e-komunumo estas sekundara por la anoj – ili havas siajn primarajn etnolingvajn komunumojn en kiuj ili realigas sian ĉiutagan vivon.
6. Reprodukta diagramo – premisoj:
 - a) en analizata regiono aktuale estas 1000 esperanto-parolantoj (ekz-e je nivelo B1 aŭ B2)
 - b) el inter ili 40% estas pli ol 60-jaraj, do forpasos averaĝe post 20 jaroj
 - c) kiel aspektas la kurboj (linioj) de populaciŝanĝo dum sekvontaj periodoj depende de la reprodukta koeficiento (proporcio de anstataŭigo de forpasatoj per novuloj):



d) videblas, ke se la reprodukto estas 0,5 (t.e. dum 20 jaroj forpasas 400, venas 200) – post 60 jaroj la populacio de e-parolantoj reduktiĝos al 500, post 100 jaroj al 328

7. Se ni modifos iom la parametrojn:

a) 50% estas super 60, la koeficiento 0,2:



a) videblas, ke se la reprodukto estas 0,2 (t.e. dum 20 jaroj forpasas 500, venas 100) – jam post 30 jaroj la populacio de e-parolantoj reduktiĝos al 500, post 100 jaroj al 78, do probable entute malaperos, ĉar jam post 60 jaroj estos praktike je la limo de travivebleco.

8. La diagramoj **montras la minacojn al travivebleco de Eesperanto** en tiu regiono.

9. Aktuala evolufazo en Pollando – vojo al degenero
 - a) en antaŭ-raŭmisma kaj fru-raŭmisma periodoj Esperantio bone disvolviĝis plurcentre en Pollando
 - b) en 1985 (dum la militara ĥunto) okazis en PEA interna puĉo subtenata de pola sekurecpolico kaj UEA , kiu ĉi-loke haltis draste internan evoluon
 - c) multaj homoj forlasis sian aktivadon, rezignis, ne trovis sencon
 - d) la novvenintaj pintuloj (el la epoko antaŭ 1980) haltis formadon de aktivuloj, evoluigon de e-instruistoj, internajn bultenojn, riĉan eldonadon – ne estis interesitaj pri tio, nek emis/kapablis trovi aktivulojn por fari tion
 - e) posta alveno de kapitalismo ne kulpas tiom grandan degeneron kiu sekvis – ja en multaj kapitalismaj landoj la stagno nek okazis nek okazas
 - f) la situacio en Pollando estas specifa – rezultis en ekstrema manko de kadroj post 1985 kion oni suferas ĝis nun.
10. Generacioj en Polando:
 - a) **Generacio 70** - homoj kiuj eniris Esperantion en la 70-aj jaroj, plenaj da energio, kapabloj, efikaj
 - i. poiome kadukiĝanta – sed ankoraŭ kapablas kaj pretas helpi
 - b) **Generacio 2000** – homoj kiuj eniris Esperantion komence de la 20a jarcento
 - i. bedaŭrinde ne tro forta, nek multnombra, iom pasiva
 - c) **Generacio 30** – homoj kiuj povas ricevi ŝancon eniri baldaŭ
 - i. se ne okazos daŭra stagno/degenero.
11. Esperantio eniras valorkonscian periodon kun reprodukta defio
 - a) enkadre de plurlingvisma kaj plurkultureca edukstrategioj de Eŭropa Konsilio rilate instruadon de fremdlingvoj indas aktivi laŭ tio kaj kongrue al tiu politiko, ne kontraŭ
 - b) valoras kaj eblas pliriĉigi ĝin per esperanto lernado.
12. Informado kaj varbado
 - a) **oni forlasu la merkaton de ideoj – transiru al la merkato de rimedoj** kaj hobiaj
 - b) prezentiitaj estis 3 celgrupoj kiujn oni devas aliri diverse por motivigi ilin eklerni esperanton: mezlernejanoj kaj studentoj, mezaĝuloj, senioroj (pensiuloj) kun listo da valoroj kiujn indas oferti al ili rilate priokupon pri esperanto.
13. Ne sufiĉis tempo por priskribi la aktualan bildon de e-aktiveblecoj kaj formoj globe kaj enlande
 - a) la bildo estas tre decentrigita, Esperantio havas centrojn kaj punktojn sur la mapo kiuj jen malaperas jen aperas depende de unu persono kaj grupo ĉirkaŭe, ne plu tiom de la organizaj formalaj strukturoj
 - b) krome pli kaj pli gravas la senteritoria interreto.
14. Bezono je bona scipovo de fremdaj lingvoj povos malkreski kaŭze de aŭtomataj tradukiloj sed tamen restos la bezono de interhomaj senperaj kontaktoj kun parolantoj de aliaj lingvoj.

II. Jerzy Leyk (Fondaĵo PLURIKO - direktoro de la Estraro) – demonstro de la lernolibro *Aventuro per Esperanto*:



1. La lernolibron preparis enkadre de PLURIKO teamo da pluraj kontribuantoj surbaze de la lernolibro de Edward Malewicz eldonita en 2018. La aŭtoraj rajtoj de la nuna eldono estas ĉe PLURIKO.
2. La nuna eldono estas destinita por pollingvanoj.
3. La nuna eldono estas elŝutebla senpage el la paĝaro pluriko.net: [Lernolibro de Esperanto](#) en formo de 10 unuopaj kajeroj (dosieroj), inkluzive la *Gvidilon* por instruantoj kaj memlernantoj.
 - a) akompanas ĝin sonmatrerialoj (ne videblaj sed lokigitaj en la paĝaro), atingeblaj per QR-kodoj troviĝantaj diversloke sur la paĝoj de la lernolibro (sur la ekrano aŭ printitaj paperslipoj) – laŭ jena modelo:

NI AŬSKULTAS KUN KOMPRENO

Słuchamy ze zrozumieniem

10. Poniżej znajduje się tekst audycji radiowej fikcyjnej rozgłośni esperanckiej o hobby trzech osób (lektor odgrywa treść z nagrania lub odczytuje na głos). Informację o hobby każdej z osób potraktuj jako wiadomość. Słuchając, uzupełnij trzy poniższe zdania.



4. Printita lernolibro en formato A4 sur unu flanko de la folio estas realitive dika. En la formato de du paĝoj po A5 per A4 folio, printita ambaŭflanke estas multe malpli dika – havas preskaŭ 65 foliojn.
5. Listo de la teamo (la ceteraj estas menciitaj en *Przedmowa*):

Autor pierwszego wydania:
Edward Malewicz, 2021

Adaptacja do drugiego wydania:
Edward Malewicz, Ryszard Rokicki, Jerzy Leyk

Redaktor inicjujący:
Ryszard Rokicki

Redaktor prowadzący i skład:
Jerzy Leyk

Grafika okładki:
Jan Wawrynkiewicz

Ilustracje do tekstów:
Mateusz Rokicki

Ilustracje do ćwiczeń:
Karol Leyk

Generacja obrazów:
Edward Malewicz przy użyciu:
AI Microsoft Copilot, Clipdrop stability.ai
Dream by WOMBO

Nagrania tekstów:
Laura Brazzabeni, Aaron Chapman
Petra Dückerhoff, Tatiana Gliniak, Karol Leyk

Konsultacje:
Kamil Getka, Wojciech Usakiewicz

Recenzja:
Rafał Darasz (Uniwersytet Warszawski)
Przemysław Grzybowski (Uniwersytet Kazimierza Wielkiego w Bydgoszczy)
Ilona Koutny (Uniwersytet Adama Mickiewicza w Poznaniu)
Jouko Lindstedt (Uniwersytet Helsiński)

Testowanie podręcznika na kursach:
Małgorzata J. Komarnicka
Przemysław Wierzbowski

Prawa autorskie: © Centro pri Plurlingvismo kaj Interkultura Komunikado – PLURIKO, 2025
Wydawca: Ośrodek Plurlingwizmu i Komunikacji Międzykulturowej – PLURIKO, Warszawa 2025

III. Ilona Koutny (emerita profesoro de Universitato Adam Mickiewicz en Poznań) – recenzo pri la lernolibro – ĉefaj tezoj:

1. La lernolibro estas modernigita eldono de la antaŭaj verkoj de E. Malewicz.
2. Sekvas priskribo de la strukturo de la lernolibro
 - a) ĉar la ĉapitroj estas ampleksaj la instruanto devas bone pripensi kiel krei unuopajn lecionojn.
3. Estas relative multe da tradukaj ekzercoj, dezirindus pli da komunikaj.
4. Ekzistas pluraj lernolibroj de esperanto por poloj, ili tamen estas jam malnovaj, ne allogaj, sen koloraj bildoj. Mencieblas ankaŭ aliaj internaciskalaj lernolibroj haveblaj en pola versio uzantaj aliajn metodojn.
5. *Aventura per Esperanto* havas plurajn avantaĝojn:
 - a) ĝi estas aparte kreita por polaj lernantoj, do atentigas pri apartaj problemoj de pollingvaj lernantoj
 - b) estas belaspekta kaj alloga, facile elŝutebla el la reto
 - c) plifirmigaj taskoj estas didakte tre taŭgaj
 - d) apliko de QR-kodoj estas moderna kaj utila [temas pri la ebleco tiamaniere tuj konekti kun la reto por aŭskulti sonmaterialojn – rim. JL]
 - e) mi scias ke estas plano kompletigi ĝin per aldonaj retaj ekzercoj.
6. La lernolibro taŭgas:
 - a) por la uzo en lernejoj
 - b) por pretigi al KER erkzamenoj (A2)
 - c) kaj ankaŭ por memlernado, ĉar enhavas multajn klarigojn.

IV. Przemysław Wierzbowski (BES - la unua instruisto uzanta la lernolibron dum ĉeestaj kursoj – Bjalistoko) – recenzo pri la lernolibro – ĉefaj tezoj:

1. Aktuale dum la kurso estas preskaŭ finrealigita ĉapitro 4. La kurson partoprenas 13 personoj en diversa aĝo (studentoj, plenkreskuloj kaj pli aĝaj plenkreskuloj).
2. La etoso estas tre bona.
3. Du formoj de la lecionoj estas interplektitaj: unu semajnon ĉeeste (pli da konversacioj, dialogoj) la sekvan interrete (pli da taskoj, ludoj, ktp.). Prilaboro de unu ĉapitro daŭras proksimume unu monaton.
4. Tre utila por mi kiel instruisto estas la *Gvidilo*, kiu enhavas detalajn priskribojn kiel realigi diverstipajn didaktajn erojn. Tion mi trovas estas escepte taŭga por instruantoj ankoraŭ ne tro spertaj, ĉar donas bonajn konsilojn kaj gvidas la instruanton.
5. Krome la proponataj skemoj kiel dividi ĉiun ĉapitron je lecionoj helpis min adapti la lernoprocezon al konkretaj situacioj.
6. La lernantoj ŝatas la lernolibron. Opinions ĝin klare kaj bone strukturita.
7. La vortprovizo en la sekcio kun bildoj estas utila kaj bona por ekzercado sed estas tro riĉa je vortoj, la partoprenantoj ne sukcesas parkerigi ilin.

8. Iom mankas situaciaj taskoj kun roloj. Ankaŭ taskoj por mem krei dialogojn ne estas facilaj por sekvi: bonvenaj estus iuj konkretaj proponoj.
9. Tro malfue estas enkondukata la -is tempo. En la kvara ĉapitro ne jam. Tio malhelpas al la lernanto rakonti kio okazis, ekzemple hieraŭ.

V. Jouko Lindstedt (emerita profesoro de Universitato de Helsinki) – recenzo pri la lernolibro – ĉefaj tezoj:

Fragmentojn de la skriba recenzo citis Jerzy Leyk.

1. „La ĝeneralan aranĝon de la libro mi trovas bona kaj funkcia, kun instruaj ĉapitroj kaj ekzercoj en ĝusta proporcio. La ĝenerala nivelo de la libro konformas al la KER-nivelo A2 – efektive la lasta ĉapitro, en si mem tre sukcesa, estas eĉ iom supera al A2.”
2. „La ilustraĵoj taŭge subtenas la lernotaĵojn.”
3. „En la ilustraĵoj estas iom tro reprezentataj sveltaj gejunuloj eŭropdevenaj. Konsidere la celgrupon de la lernolibro, la multeco de ĝuste junaj homoj estas eble komprenebla, sed devus aperi ankaŭ gejunuloj kun ne tiom perfektaj korpoj. Oni devus ankaŭ pliigi la nombron de la ekstereŭropanoj, kaj en la bildoj kaj en la tekstomaterialo.”
4. „La porinstruista *Gvidilo* estas admirinde ampleksa kaj detala.”, „... por nesperta [instruanto] ĝi proponas firman subtenon.”
5. „La materialo estas uzebla ankaŭ por memlernado.”
6. „Mi rekomendas la libron por lerneja uzo post kiam la aŭtoroj atentis miajn komentojn.”

VI. Jerzy Leyk – projekto DEL – Disvolvo de Esperanto-Lernado en Pollando – diskuto

1. Bedaŭrinde efektiva diskuto pri la projekto ne okazis – partoprenantoj el [Generacio 2000](#) malaperis (krom la Varsovia grupeto, Anna kaj Przemek) aŭ tute ne konektiĝis. Diskutis do e-dinosaŭroj el la [Generacio 70](#).
2. JL prezentis la koncepton formi du laborgrupojn (teamojn) por realigi la projekton:
 - a) Organizan – informado kaj varbado por akiri e-lernantojn kaj aranĝi lernadon/instruadon
 - b) Instruan – kolekto de instruantoj kaj mentoroj, ties preparado por instruado kaj mentora laboro.
3. Por komencantoj oni konsideris i.a. kurson por memlernantoj kun kaj sen mentoroj, paroligajn kursojn somerajn okaze de eventoj en Pollando, retan kurson.
4. La 2-a minikonferenco DEL estas planita **la 26-an de septembro 2026**.
5. Necesas antaŭe inspiri kaj mobilizi homojn el [Generacio 2000](#), kiu nun respondecas pri disvolvo de e-lernado en Pollando – por kontraŭstari la degeneron de e-populacio tie-ĉi, pri kio atentigis JL en sia prelego.

VII. Listo de koncernatoj (invititaj kaj partoprenantaj personoj)

Projekto DEL - koncernatoj							
N-o	Persono	Loĝloko	Retadreso	Invitinformo	Konfirmo	Partopreno (+ rete)	Komentoj
				2026.05.23 1-a minikonferenco DEL			
1	Anna Cisło	Wrocław	anna.cislo@uwr.edu.pl	+	+	+	
2	Rafał Darasz	Warszawa	rafal.b.darasz@gmail.com	+	?	-	
3	Bogdan Dembiec	Wrocław	bogdem1@wp.pl	+	?	+	
4	Kamil Getka	Warszawa	kamil.getka@student.uw.edu.pl	+	+	-	
5	Przemysław Grzybowski	Bydgoszcz	przemekgrzybowski@poczta.onet.pl	+	+	+	
6	Robert Kamiński	Łódź	rk-lodz@wp.pl	+	?	+	
7	Małgorzata Komarnicka	?	malgosia.eo@gmail.com	+	+	-	
8	Ilona Koutny	Poznań	ilona.koutny@amu.edu.pl	+	+	+	
9	Jerzy Leyk	Łoś	jerzy.leyk@op.pl	+	+	surloke	
10	Maria Majerczak	Kraków	mmajerczak@gmail.com	+	-	-	salutas, ne povas partopreni
11	Edward Malewicz	Kraków	edewicz@gmail.com	+	-	-	rifuzas
12	Elżbieta Malik	Poznań	e.malik@wp.eu	+	?	-	
13	Alina Mozer	Warszawa	alwamo@wp.pl	+	+	+	
14	Ryszard Rokicki	Michałowice	ryszard.rokicki@gmail.com	+	+	+	
15	Szilva Szabolcs	Warszawa	szabolcsszilva@gmail.com	+	+	-	
16	Magdalena Tatara	Kraków	mtatara@gmail.com	+	+	-	
17	Wojciech Usakiewicz	Warszawa	wusakie@gmail.com	+	?	-	
18	Jacek Warda	Lublin	warda.jacek@gmail.com	+	+	+	
19	Przemysław Wierzbowski	Białystok	pwierzbowski@gmail.com	+	+	surloke	
20	Natalia Żebrowska	Warszawa	natalia.m.zebrowska@gmail.com	+	?	-	
21	Łukasz Żebrowski	Warszawa	lukasz.zebrowski@gmail.com	+	?	-	
22	Walter Żelazny	Białystok	walterz@hotmail.fr	+	+	-	ne sukcesis konekti
23	Grażyna Banel	Białystok	gbanel@o2.pl			surloke	
24	Elżbieta Karczewska	Białystok				surloke	
25	Anna Mocarcka	Białystok				surloke	
26	Zofia Śmistek	Białystok				surloke	
27	Iza Walentynowicz	Białystok				surloke	
28	??	Warszawa				+	
29	??	Warszawa				+	
Sume:				22	15	10 + 7 = 17	